

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)



NIAJ PLANOJ

ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama.

*Regulaj Klasoj en sabato: Daŭriga Kurso / Mezaj Klasoj 1, 2 kaj 3 / Jokohama Salono.

*Regula Klaso en merkredo

*Hama-Ronda Vespero

sept. 17 (sab) 17h00-19h00, ĉambro 710

Temo: Rigardi DVD-filmon

Parolanto: s-ino DOI Ĉieko

Rigardi dokumentan DVD-filmon kun esperanta voĉo, "Jokohamaj simbolaj konstruaĵoj de la jaro 1930". Post la granda tertremo atakinta Jokohamon en 1923, oni konstruis multe da novaj domoj ktp, kaj la filmo temas pri ili.

*Enkonduka seminario senpaga

okt. 29 (sab) 15h15-16h45, ĉambro 702

Post la "Ekspozicio al la Urbanoj" estos enkonduko. Kurso komenciĝos de la 5a de novembro, por 10 fojoj.

*Rudimenta kurso

De nov. 5, por 10 semajnoj. Kotizo 5000 enoj.



TIEL OKAZIS EN LA HAMA-RONDA VESPERO

jul. 16 (sab) 17h00-19h00, ĉambro 710

Temo: Ekstersonoren : propra aspekto pri muziko, lingvo, teknologio...

Preleganto: s-ro SAEKI Hiroyuki (komponisto)

S-ro Saeki, lerninta Esperanton en nia rondo, poste utiligis en sia laboro kiel muzikisto, esperantecan temon. Nome li komponis en 2006, la verkon "... sed blinda celo", influite de "Infana Raso" de William Auld. Li parolis pri la avangarada flanko de sia laboro, utiliganta realan voĉon kaj komputile sintezitan muzikon.



■ Eldonas Aida Yayoi ■ Redaktas la organa fako de JER: Miyazaki Hideko
 ■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
 ■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
 ■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

EKSPOZICIO AL LA URBANOJ

En la 22a kaj 23a de oktobro, okazos Internacia Festo de Jokohamo, en kiu nia rondo aliĝos. Ni intencas ekspozicion pri Esperanto sub unu el la tendoj en la Parko Zoo-no-Hana en la havena distrikto de Jokohamo.

EKSKURSO AL YAMAGATA

Kiel ekskurso de la rondanoj, ni ĉi-jare vizitos varmfontejon Sirabu en Gubernio Yamagata. Tio okazos en la 30a kaj 31a de oktobro. Ĉar estas malproksima loko, frua sinanonco estas petata.



EKSKURSO TRA LA MISTEROJ DE ROMO 1



Glaŭco G. Pompilio

Antaŭ kelkaj monatoj mi revenis hejmen el unu el miaj oftaj vojaĝoj al Romo kun miaj scio kaj interesoj pri la tiel nomata “Eterna Urbo” treege pligrandiĝintaj.

Dank'al amiko, tre klera kvankam stranga homo, por la unua fojo mi havis la okazon observi la ĉefurbon de Italio tra nova kaj siaspeca vidpunkto, kiun mi povus difini kiel “Romo tra ĝiaj misteroj”.

Mi estis tiel impresita de la tuta malkovro ke mi sentas min devigata dividi mian sperton, ekzemple, kun la legantoj de Tamtamo pere de ideala promonado tra la misteroj de Romo.

Ni komencu, do, de la preĝejo nomata “Sakra Koro de Propeto”.

Tiu ĉi preĝejo troviĝas en Strato Prati, laŭlonge de la rivero Tevere. Tra la fera pordo la vizitantoj estas gvidataj al salono nomata “Relikvejo de la Animoj el Purgatorio”, kie eblas vidi materiajn pruvojn, ĉiuj aŭtentigitaj fare de pastroj de la Katolika Eklezio, kiuj laŭdire estis portitaj tien de animoj suferantaj en la Purgatorio.

Laŭ la katolika kredo la animo de ĉiu mortinto iras aŭ al la Infero aŭ al la Paradizo.

Tamen, dum la animoj por la Infero, tiuj kun nepardoneblaj pekoj, iras rekte al sia celo, la animoj por la Paradizo, antaŭ ol atingi sian celon, devas pasigi pli aŭ malpli longan tempon en la Purgatorio por purigi sin de pardoneblaj pekoj.

Ĉiu objekto en la relikvejo estas detale priskribita kaj aŭtentigita.

Inter tiuj objektoj troviĝas, ekzemple, la

bruligita postsigno de la maldekstra mano de iu suferanta animo ĉu sur peco de ligno ĉu sur tuniko de monaĥino.

Tio ĉi okazis en la jaro 1731 kaj ĉiuj koncernaj dokumentoj klare pravas la okazintaĵon.

Ekzistas ankaŭ pruvo de monaĥino, kiu, post sia morto, revenis surteren por informi la fratinojn de sia monaĥinejo pri sia restado en la Purgatorio.

De ĉi tie ni iru nun al Placo Navona, tre konata parto de Romo.

En tiu ĉi placo estas fontano ligita al stranga sorĉaĵo.

Estas, fakte, konate ke kiu ajn iras ĉirkaŭ la fontano laŭ maldekstra direkto kune kun sia partnero - edzo, edzino, amanto, amantino aŭ io simila - perdas ŝin aŭ lin ene de unu semajno. Tio ĉi estas certigita jam plurfoje, kvankam ne scienca pruvo ekzistas ĝis nun.

Tamen ke io stranga estas ligita al tiu ĉi fontano pravas la fakto ke kiu ajn, eĉ homoj kiuj ne scias pri la sorĉaĵo, spontane evitas iri ĉirkaŭ la fontano laŭ maldekstruma direkto.

Nekonscie kaj instinkte ĉiuj iras dekstren.

Nur tiuj kiuj intence volas liberigi sin de finiĝinta amo aŭ rilato prenas la maldekstran direkton.

Kaj nun de fontano al katakombo kaj pli precize al Katakombo de Sankta Kalisto.

Ĉiuj scias kio estas katakombo kaj verŝajne ĉiuj scias ke en Romo estas pluraj el ili.

Mi, ĉiukaze, diru ke katakombo konsistas el subteraj tuneloj kie la unuaj kristanoj, tiutempe persekutataj, kaŝis sin.

Do, unu el tiuj katakomboj, kaj certe la plej

konata, estas la Katakombo de Sankta Kalisto. En 1936 tuta klaso de elementaj lernejoj malaperis post eniro en tiun ĉi katakombon kaj nur tri tagojn poste instruistoj kaj lernejoj, ĉiuj tute elĉerpitaj, reaperis ĉe Ostia, urbeto ĉe la maro plurajn dekkilometrojn for de la enirejo de la katakombo.

En la pasinteco, sed ankaŭ lastatempe, ne malmultaj vizitantoj perdiĝis kaj ne plu reaperis - ne nur en tiu ĉi katakombo, sed ankaŭ en pluraj aliaj katakomboj de Romo.

En la Katakombo de Sankta Kalisto, ekzemple, nur ĉirkaŭ 20 kilometroj estas esploritaj, dum ankoraŭ multaj koridoroj restas fermitaj de rokoj, terŝoviĝoj kaj aliaj obstakloj.

Kio estas en tiu ĉi nepenetrebla kaj neesplorita labirinto neniue scias. Onidiroj parolas pri kaŝitaj trezoroj, artaĵoj kaj tiel plu.

Malpli konataj, sed ne malpli interesaj, estas la Ĝardenoj Mendosi, tiel nomataj laŭ la nomo de la familio kiu ilin posedis.

La Ĝardenoj troviĝas proksime de Placo Fiume kaj en ili estas videbla, ankoraŭ tute en sia originala formo, la Templo de la diino Vesta.

Estas tre malfacile kaj sufiĉe danĝere eniri ĝiajn subterajn koridorojn pro la multaj obstakloj laŭvoje kaj pro la multaj reptiloj - kelkaj el ili venenaj - kiuj tie vivas.

En la antikvaj tempoj tiuj pastrinoj de la diino Vesta, kiuj estis akuzitaj je perdo de sia virgeco, estis kondukitaj ĉi tien kaj - post makabra ceremonio - oferbuĉitaj al la diino.

Kaj ankoraŭ nun la spiritoj de la viktimoj aperas de tempo al tempo kiel blankaj figuroj eligante siajn ĝemojn.

(daŭrigota)



Tertremo kaj Japanio

Mizro Iwaya

Japana insularo staras apud la limo inter du grandaj tektonaj platoj: oceana kaj kontinenta. Interna mantelo de la terglobo movas la platojn tie en la sama centriga direkto kaj, sekve, najbaraj du platoj kolizias unu kontraŭ la alia. Rezulte, kutime la oceana plato iras suben, sed ne ĉiam glate, fojfoje kun risorta salto. Tiamaniere okazas tertremo ofte en Japanio. Orientjapana Granda Tertremo en la 11a de marto, ĉi-jara, estas unu el ili.

Historie fama tertremo estas t.n. Kantoa Granda Tertremo en 1923. Ties magnitudo estis iom malpli ol tiu de la Orientjapana, sed ĝi trafis ĝuste la popolamasan regionon de Japanio. Tial la nombro de mortintoj estis la plej granda, pli ol 100 miloj, eĉ kvarobla ol tiu de Orientjapana Tertremo. Rilate al la Orientjapana, ni vidas ke la cunamo post la tertremo estis la ĉefa kaŭzo de viktimoj. Estis antaŭdecidite ke oni forfuĝu al proksima alta konstruaĵo okaze de granda tertrema atako, sed fakte la grandeco de la cunamo superis la altecon de la domo, kaj ĝi elglutis tegmentetaĝe helpvokantajn homojn.

Do, kia statis la afero en la Kantoa? Cunamo ne estis tiel granda kun ĝi. La ĉefa kaŭzo estis fajro! Densa starigo de lignaj domoj ebligis

rapidan propagiĝon de fajro. Ĝi samtempe stariĝis en diversaj lokoj de la urbego kaj tuj grandiĝis pli kaj pli. Oni diras ke Tokio izoliĝis en la maro de fajro kelkajn horojn post la tertremo. Restas diversaj tragedioj tiurilate. La plej korŝira estas la raporto, ke loĝantoj forfuĝis el fajro en najbaran parkon, kie alvenis fajro ĝis la ĉiufanke starantaj domoj kun ĝisĉiela brulego. La rifuĝintoj ne povis eskapi, kaj senhelpe "vaporkuirigis" amase. Tia okazaĵo aperis en pluraj lokoj de la urbo.

Tia tragedio trafis ankaŭ tiaman Jokohamon, ĉar la tremcentro troviĝis en marmezo trans Kanagaŭa. Antaŭ du monatoj ni jokohamanoj saviĝis pro la fakto ke ĉi-foja Orientjapana Tertremo okazis multe for de nia urbo. Oni nun diras ke post kelkaj aŭ dekkelkaj jaroj sekvos granda tertremo en la Tokaja Maro ...



Korekton mi petas!



En paĝo 2 de la julia numero, ĉe "INTERKLASA LERNADO" estis eraro. **Cse-metodo** devas esti **Cseh-metodo**.

Tetrinkejo ĉe montokolo (Parto 2)

verkis Ogaŭa Mimei

esperantigis AIDA Kiyoshi

Iun tagon li ekaŭdis la onidiron de vilaĝano, kiu ripozis ĉe la tetrinkejo.

“Avĉjo, lastatempe ameo-vendisto venis ĉi tien kaj tro ebriiĝis, ĉu ne?”

“Jes, li revenis hejmen ebrie,” -respondis la avĉjo kun rideto.

“Sendube, li estis en la arbaro la tutan nokton trompote de vulpo.”

“Aha, la ameo-vendisto?” -la avĉjo surpriziĝis.

“Li serĉis la vojon al la urbeto, sed vane kaj li ripete rondiris sur la sama vojo. Vekiĝinte li trovis, ke li dormis en la arbaro de la okcidenta monto” -diris la vilaĝano.

Tiam la ameo-vendisto rakontis pri sia juneco bonhumore, “Mi iris al la okcidenta monto por kolekti fungojn en mia knaba tempo,” -li sopire rememoris. Li ne povis facile rememori la monton. Li parolis al la vilaĝano pri tiama stato, ke li ŝajne perdis la vojon kaj erare eniris en la arbaron, ĉar li estis tro ebria.

La vilaĝano diris ridete, “Kompreneble li eble estis en tia stato. Probable jes. Estus strange kaj absurde, ke nunan tempulon trompus vulpo.”

Sed la rakonto pri la vulpo ŝajnvare disvastiĝis. La sekvantan tagon la vicvilaĝestro venis en la tetrinkejon kaj demandis, “Avĉjo, mi aŭdis, ke lastatempe malbona vulpo tumultigis homojn. Ĉu okazis neordinara afero ĉi tie?”

“Onidire la ameo-vendisto estis trompita” - diris la avĉjo kun rideto.

“Oni diras, ke salumitaj salmoj kunportitaj de la virinoj de la vilaĝo revenvoje el la urbo estis ŝtelitaj. Ja, ili estis ŝtelitaj de malantaŭo.”

“Kiam ĝi okazis?”

“Antaŭ kelkaj tagoj tio ŝajne okazis antaŭ la malheleta vesperiĝo.”

Aŭdinte tion, aperis antaŭ la okuloj de la avĉjo la vizaĝoj de kelkaj junaj virinoj, kiuj preterpaŝis antaŭ la tetrinkejo multe babilante. Unu el ili portis salmon pendantan surdorse kaj ĉiufoje kiam ŝi ridis kun sinskuo, la salmo svingiĝis dekstren kaj maldekstren kiel pendolo. La memoro reviviĝis al li: li zorgis ke la salmo ne

falu survoje.

“Kiam la vetero fariĝos malvarma pli kaj pli kaj mankos nutraĵo, vulpoj petolos homojn.” Tiel dirinte la vicvilaĝestro metis fajron al tabako.

“Ĉu ŝi ne faligis ĝin survoje?” -diris la avĉjo. “Ne, oni vidis la dorson de la forkuranta vulpo. Do, tio estas fakto.” La vicvilaĝestro kredis tion.

“Avĉjo, okazu io ajn, mi ne havas intereson. Pli ol tio gravas la diraĵo ke venontjare aŭtobuso trapasos ĉi tien.” Diris la vicestro fanfarone.

“Buso?”

“Ĉu vi ŝajnas ne scii la novaĵon? Se tio okazos, neniu piediros kiel antaŭe.” “Neniu piediros. Tiam kiel fariĝos tiu tetrinkejo?” -diris la avĉjo malvigle.

“Ĉiuj aferoj havas bonajn kaj malbonajn flankojn. Sed ĉio dependas de la cerba funkcio. Pripensu, ke multaj homoj venos ĉi tien de proksimaj vilaĝoj. Se bushaltejo staros antaŭ ĉi tiu tetrinkejo, vi havos multajn klientojn.” “Ĉu vere?” La avĉjo proponis al la vicestro nove preparitan teon klinante blankharan kapon. La vicestro diris prenante la tason.

“Pripensu pri tio kaj klopodu. Estus bone, se vi farus kiel eble plej rapide.” Mi ne povas iri nenien sola por la klopodo, ĉar mi estas tre maljuna” -respondis la avĉjo respektoplene frotante al si la sulkitajn manojn sur la femuroj. “Se vi volus, mi volonte klopodus anstataŭ vi.”

La juna vicestro rigore rigardis la vizaĝon de la avĉjo por legi la koron. La avĉjo pensis en la koro, ke li ĉiukaze bezonos monon por tio. Kiom da mono bezonos por realigi la celon? Li sinĝene pripensis. “Vi ne bezonos tuj decidi ion, ĉar vi ĵus aŭdis tion. Avĉjo, pripensu malrapide kaj decidu” - la vicestro postlasis la vortojn kaj forlasis la tetrinkejon.

De tiam la avĉjo sentis maltrankvilon, kiam nova problemo okazis al li. Tio ŝajne rilatis al lia aĝo. Kaj li pensis pri sia sola filo loĝanta malproksime. Li foje pripensis, ke li vivos kune kun sia filo.

(daŭrigota)

